La observoj estas tre proksimaj por povi utiligi ilin kiel du, pro kio ni eltiru la mezan observon kun la moviĝdirekto $d\alpha = -32^s{,}5 = -0^0{,}135416$, $d\delta = -7'{,}1 = -0^0{,}118334$. Kalkulita por k^{-1} tagoj, en radianoj, ĝi fariĝas (multipliko per 58,13244087:57,2957795 = 1,0146025):

$$d\alpha = -0{,}137393, \qquad d\delta = -0{,}120062.$$

Oni bezonas ankoraŭ, laŭ la rezonado el [7], por $\Delta\mathbf{R}$ preni la mezan valoron de $\Delta\mathbf{R}$ por ambaŭ observomomentoj (kio ĉi tie estas la samaj kvantoj) kaj la komencaj donoj estos:

Sept. 7,3846 UT, ekv. 1940,0

E	+ 958 52 55	+ 017 85 74	+ 284 44 71
t	+ 036 59 88	— 131 05 86	— 115 10 25
R	— 971 24 31	+ 245 78 08	+ 106 62 29
V	— 249 20 21	— 881 58 60	— 382 32 19

(La donoj estas en la unuoj 10^{-7}; dum kalkulado mi ĉiam prenas 2—3 decimalojn pli ol oni efektive rajtas — por evitadi la akumuladon de kalkuleraroj).

Plua kalkulado de la bezonaj kvantoj donas

$\mathbf{t}^2$ 0,0317644, **Rt** —0,0800305,
VE —0,3633598, **RV** —0,0154053,
RE —0,8962437, $\mathbf{R}^2$ 1,0150898, w 0,211837,
Vt + 0,1504251, β + 0,357787 , γ 1,154990,

$\alpha = +0{,}4128389$. La ekvacioj fariĝas

$$r^2 = x^2 + 0{,}211837,$$

$$\frac{1}{r} = 1{,}154990 + 0{,}031764\,x^2 - 0{,}357787\,x +$$

$$+\frac{0{,}412839}{x}\left(\frac{0{,}4128}{x}-0{,}16006\right).$$

La parabolo minimumas por $x = 5{,}25$ kaj ĵus oni havas la kazon kiam la antaŭsolvo estas neefektiva, ĉar en la tranĉopunkto $x > 6$. Tio signifas ke oni havas la formon en la bildo 3b kaj ni serĉu la kvanton $\frac{1}{r}$ por x ĉirkaŭ 3 kaj 4. Per kelkaj provoj ni trovas

$$x = 2{,}56245,\ \rho = 2{,}66621,\ \rho' = -0{,}32750,$$
$$\mathbf{r}_0 + 3{,}526\ 824 - 0{,}198\ 135 + 0{,}651\ 833$$
$$\mathbf{v}_0 + 0{,}032\ 861 + 0{,}526\ 308 - 0{,}017\ 723.$$

Ĉar la planedeto estas post tio jam observita plurfoje (v. *Bulletin* Astr. obs. Beograd, V, p. 32) mi kalkulis la efemeridon, kiu donas O—K:

Dato	IX 9,957	13,104	21,782	28,876	X 11,055
$\Delta\alpha$	$0^m{,}0$	$+0^m{,}1$	$-0^m{,}6$	$-0^m{,}9$	$-1^m{,}1$
$\Delta\delta$	0′	−1′	−14′	−28′	−58′

La ekzemplo estas prenita por montri uzeblecon de cirklaj orbitoj por kalkuli la efemeridon dum la sama opozicio, ĉar — malgraŭ neprecizaj ρ kaj r — la efemerido kontentigas por pli ol unu monato. Laŭ la elementoj de la planedeto 1554 (1940 *RE*) $a = 2{,}62$ kaj en la observomomento r estis multe malprigranda (ĉar la pozicio estas periheliproksima kaj la ekscentriĝo 0,2). Pro tio la dua ekvacio (15), laŭ (13), kontentiĝas tre malbone, el kio sekvas granda diferenco inter la halkulita kaj la reala r. Pro tio mi revenos pli detale (en la sekvanta punkto) ĵus al tiaj devioj kaj al ebleco de ilia plietigo.

Kiel la duan ekzemplon prenu la planedeton 1933 *QE*, por kiu *M. Nishiyama* (*MPC* 680) trovis $i = 44^0{,}8$, $r = 3{,}79$. Pro la neordinara inklino mi prenis kalkuli la orbiton el la observoj de 20-a kaj 21-a de aŭgusto, same kiel en la antaŭa ekzemplo, kaj mi venis al la ekvacioj

$$r^2 = x^2 + 0{,}03607$$
$$\frac{1}{r} = 1{,}446205 + 0{,}062752x^2 - 0{,}55003x +$$
$$+\frac{0{,}195254}{x}\left(\frac{0{,}19525}{x}-0{,}09439\right).$$

Ankaŭ ĉi tie la parabolminimumo malproksimas (preskaŭ 4,5) kaj oni havas denove la formon 3b. La rekta kalkulo donas du proksimajn solvojn: $x = 3{,}59$ ($\rho' = -0{,}1298$) kaj $x = 4{,}097$ ($\rho' = -0{,}1365$). Kun ĉi tiuj solvoj ni havas:

$$\mathbf{C}(+0{,}40800,\ +0{,}43737,\ +1{,}79928)\ \text{kaj}$$
$$\mathbf{C}(+0{,}59764,\ +0{,}88063,\ +1{,}72290).$$

Pro komparo kun la menciita solvo de *Nishiyama* mi kalkulis de ĉi tie, laŭ la formuloj (8) kaj (9), la inklinon kaj la orbitnodon; oni havas

$i = 38^0{,}8$	$\Omega = 159^0{,}9$,	$r = 3{,}596$	— la unua solvo
44 ,8	159 ,0	3,790	— *Nishiyama*
50 ,9	158 ,2	4,101	— la dua solvo

Okulfrapas la kongruo de la mezo de du supre trovitaj solvoj kun la tria solvo, kio montras ke du solvoj trovitaj per mia metodo kuniĝas kiam oni aplikas la metodon de *Veithen*. Konkludante laŭ la eksterordinaraj inklinoj, la vera moviĝo verŝajne plejproksimas al la unua solvo.

Kiel la trian ekzemplon, prenu kalkuli cirklan orbiton el la proksima pozicio kaj la proksima moviĝdirekto (la tagmoviĝo) de planedeto por kiu oni jam havas du orbitojn — pro komparo. Ĉe 1939*GA* mi prenis la observon de 11-a de aprilo (*CI* 1958). Ĉi tie mi aplikis la lokocentran pozicion kaj rapidon de la Suno, ĉar la moviĝdirekto estas eltirita el etdaŭra observo, kaj mi venis al la ekvacioj:

$$r^2 = x^2 + 0{,}04570,$$
$$\frac{1}{r} = 1{,}436658 + 0{,}04620\,x^2 - 0{,}51365 +$$
$$+\frac{0{,}25329}{x}\left(\frac{0{,}2533}{x}-0{,}089754\right).$$

La minimumo de la parabolo estas ĉe $x = 5{,}56$ kaj oni tuj vidas ke la dua solvo $x > 7{,}2$ estas nenatura, pro kio restas la unua solvo, por kiu 3—4 provoj donis

$$x = 2{,}835\,(\rho = 1{,}856\ ,\ r = 2{,}843)\ ,\ \rho' = +0{,}15315.$$

Facile oni trovas **C** (— 0,05242, — 0,59066, + 1,57840), kaj de tie i kaj Ω. Jen la valoroj por komparo:

$r = 2{,}843$,	$i = 3^0{,}4$,	$\Omega = 211^0{,}3$	— *Popović*
2,766	4 ,5	206,9	—*Nishiyama* (*MPC* 680)
2,538	1 ,9	225,6	— *R. Mitrinović* (nepublikigita)

Konsiderante neprecizecon de cirklaj orbitoj, la konkordo estas bona, sed al ĉi tiu ekzemplo mi ankoraŭ revenos en la lasta punkto de la verkaĵo.

Jen la ekzemplo en kiu oni havas nur unu solvon kaj la donoj estas same neprecizaj, krome ni havas du orbitojn por komparo. Ĉe la planedeto 1939 *FC* prenu la observojn de 17-a kaj 18-a de marto (*CI* 1949) kaj ni trovos la ekvaciojn

$$r^2 = x^2 + 0{,}00846$$
$$\frac{1}{r} = 1{,}58824 + 0{,}07094\,x^2 - 0{,}66943\,x +$$
$$+\frac{0{,}0316}{x}\left(\frac{0{,}0316}{x}-0{,}01684\right).$$

Ni havas nur unu solvon, kiun oni rapide trovas eĉ sen la parabolo, nome

$x = 2{,}231, \quad \rho = 1{,}239, \quad r = 2{,}233, \quad \rho' = -0{,}0353.$

La elementoj por komparo estas

r = 2,233,	i = 4°,1,	Ω = 41°,2	— *Popović*
2,342	4 ,3	41 ,2	— *Mitrinović* (nepublikigita)
2,558	6 ,1	28 ,8	— *Nishiyama* (*MPC* 680)

La kongruo de du unuaj solvoj estas plena, ĉar ambaŭ metodoj utiligas la moviĝdirekton (tagmoviĝon), sed tio ankoraŭ ne signifas ke vera moviĝo ne proksimas eble pli al la tria solvo (ĉar en ĝi estas per *Veithen*-metodo utiligita la intervalo de preskaŭ unu monato inter du observoj).

Nun interesa ekzemplo kiu montras avantaĝon de mia vektora metodo. Por la planedeto 1939*GB*, ek de la observo de 14-a de aprilo (*CI* 1958, 1972) oni trovas la ekvaciojn:

$$r^2 = x^2 + 0{,}238066$$

$$\frac{1}{r} = 1{,}085637 + 0{,}02880\,x^2 - 0{,}351503\,x + \frac{0{,}503346}{x}\left(\frac{0{,}5033}{x} - 0{,}16546\right).$$

Du solvoj montriĝas:

$$x = 2{,}5197 \ (\rho = 1{,}6431), \ \rho' = +0{,}34809,$$
$$8{,}1136 \qquad 7{,}2390 \qquad +0{,}48582.$$

La dua estas evidente nenatura, sed *Nishiyama*, (*MPC* 680) prenis ĵus ĉi tiun, ĉar la metodo ne donis al li la veran solvon, sed deflankigis lin. Tio ne eblas en la ekspozita vektormetodo. Por la komparo ni havas la rezultatojn:

r = 2,520 ,	i = 4°,0 ,	Ω = 156°,9	— la unua solvo *Popović*
8,128	39 ,9	188 8,	— la dua solvo *Popović*
7,77	42 ,2	175 ,8	— *Nishiyama*
2,446	4 ,1	158 ,6	— *Mitrinović* (nepubl.)

Plua komentario de la rezultatoj nebezona.

Ankoraŭ unu ekzemplo, kiu denove, siaflanke, montras avantaĝon de la vektora metodo. La planedeton 1939 *DE* oni observis 17-an de februaro kaj 14-an de marto (*CI* 1932, 1968). Se ni ekiros de la donoj de 17.2 ni venas al la ekvacioj

$$r^2 = x^2 + 0{,}029955$$

$$\frac{1}{r} = 1{,}08770 + 0{,}05121\,x^2 - 0{,}46675\,x + \frac{0{,}55995}{x}\left(\frac{0{,}55995}{x} - 0{,}24721\right).$$

La ekvacioj entute ne havas naturan solvon, sed la banalan solvon $\rho = 0$ kaj la nenaturan $x = 6{,}4$ ($\rho = 5{,}6$). Sed kiam ni ekiras de 14.3 tiam ni trovas bonan solvon $x = 3{,}940$. La komparataj elementoj estas:

r = 3,940 ,	i = 12°,8 ,	Ω = 337°,7	— *Popović*
3,643	11 ,6	335 ,5	— *Mitrinović* (nepubl.)
3,044	6 ,0	318 ,8	— *H. Hurukawa* (*MPC* 680).

La flua rigardo montras ke verŝajne la lasta solvo plej proksimas al realo, des pli ĉar ĝi estas trovita el du observoj kun 26-taga intervalo. Sed pli detala analizo donas alion. La efemerido kalkulita laŭ la lasta cirkla orbito donas:

	III 14,0	O—K	II 16,0	II 17,0	O—K (II 17)
α	174°,828	—0°,028	179°,321	179°,192	—0°,004
β	—3 ,576	+0 ,056	—4 ,551	—4,539	+0 ,005

Por 17-a de februaro la observo preskaŭ kongruas kun la kalkulo koncerne la pozicion. Sed kiam ni prenas la tagmoviĝon, laŭ la kalkulo ĝi estas (—0°,128, +0°,012) kaj la observodonoj por tiu dato donas (—0°,200, +0°,100). Evidentas ke tia orbito ne estas bona, resp. ke la observodonoj ne estas bonaj (la antaŭa metodo tuj montris tion, ĉar ni ne povis trovi la solvon ek de 17.2).

6) **Korektado de cirkla orbito**

La tagmoviĝon oni utiligadis por eltrovado de cirklaj orbitoj de planedetoj pli ofte kun supozo ke la projekcio de la orbito sur la ekliptiko estas cirklo ([2], [3], [8]) ol kun supozo de cirkla orbito mem. Tute dece stariĝas la demando kiu el du supozoj estas pli bona. Je la demando mi faletis ĵus ĉe la unua ekzemplo, ĉe la planedeto 1940*RE*. Nome la cirklaj elementoj kalkulitaj de *M. Protić* [8], el la samaj komencaj donoj, donis la efemeridon kiu pli bone klapis la postajn observojn ol la efemerido kiun mi trovis. Oni devis trovi la kaŭzon. En la metodo mem ne povis esti la avantaĝo, ĉar la vektora metodo estas pli rigora, precipe en tio ke la Ter-moviĝon oni ne devas preni kiel cirkla, sed tia kia ĝi estis en la observomomento. Ekzistas la ebleco ke ĵus la neglekto de la elipseco de Ter-orbito kompensis la saman neglekton ĉe la planedeto kaj pro tia kuniĝo de la cirkonstancoj ĝi donis pli ĝustan solvon. Sed la tiudirektaj provoj donis la negativan respondon.

Restis konsiderinda nur la avantaĝo (okaza aŭ konstanta) de la supozo pri cirkla projekcio kontraŭ la supozo pri cirkleco de la orbito mem. Ĉee oni devis solvi du preskaŭ apartajn problemojn: 1) ĉu kaj kiam unu el la supozoj avantaĝas kaj 2) kiel oni povas laŭbezone akomodi la vektoran metodon

al la supozo pri la cirkla projekcio? Mi ekspozos la solvon de ambaŭ problemoj.

Laŭ la ekvacioj (13) cirkla orbito kuntiras la kondiĉojn

$$(21) \qquad D \sin u = 0, \quad D \cos u = 0.$$

La respektivajn ekvaciojn sub supozo de la cirkla projekcio ni ricevos subigante al la kondiĉoj (12) la projekcion sur la ekliptika ebeno. Signu la unuovektoron de la ekliptiko per **K** kaj la projekcio de la pozicivektoro kaj de la rapido de planedeto estos

$$\mathbf{r} - \mathbf{K}(\mathbf{rK}) = [\mathbf{K}[\mathbf{rK}]], \text{ resp. } \mathbf{v} - \mathbf{K}(\mathbf{vK}) = [\mathbf{K}[\mathbf{vK}]]$$

La kondiĉoj (12) donas

$$(22) \qquad ([\mathbf{rK}][\mathbf{vK}]) = 0, \quad [\mathbf{vK}]^2 = \frac{1}{|[\mathbf{rK}]|},$$

ĉe kio la lasta ekvacio estas trovita konsidere ke la grandoj de la projekcioj egalas la grandojn de la vektoroj [**rK**] kaj [**vK**].

En la ekvacioj (22) esprimu parte **r** kaj **v** per (10) kaj (11) kaj enkonduku ankoraŭ la signojn

$$(23) \qquad (\mathbf{EK}) = e, \quad (\mathbf{tK}) = e',$$

per kio la ekvacioj fariĝos

$$\mathbf{rv} = (\mathbf{rK})(\mathbf{vK}) = \rho e(\rho e' + \rho' e),$$

$$\mathbf{v}^2 - \frac{1}{r} = (\mathbf{vK})^2 + \frac{1}{\sqrt{r^2 - (\mathbf{rK})^2}} - \frac{1}{r} =$$

$$= (\rho e' + \rho' e)^2 + \left(\frac{1}{\sqrt{r^2 - \rho^2 e^2}} - \frac{1}{r}\right).$$

Konsiderante (13) ni povas skribi la ekvaciojn ankaŭ en formo

$$(24) \qquad \begin{cases} D \sin u = E\rho e(\rho e' + \rho' e) \\ rD \cos u = r(\rho e' + \rho' e)^2 + \\ \quad + \left(1 - \dfrac{\rho^2 e^2}{r^2}\right)^{-\frac{1}{2}} - 1. \end{cases}$$

La komparo de la ekvacioj (21) kaj (24) respondos al la demando pri supereco de tiu aŭ alia supozo.

La kondiĉo $D \sin u = E\rho e(\rho e' + \rho' e)$ avantaĝas la kondiĉon $D \sin u = o$ kiam la pozicio de planedeto estas samtempe post la nodo kaj post la perihelio, resp. antaŭ la nodo kaj antaŭ la perihelio. Ĉar pri tiaj eblecoj ni nenion antaŭscias, ni ne povas scii ankaŭ kiu el la kondiĉoj pli bone konkordas kun la realo. Ni vidos poste ke tio eĉ ne multe gravas, ĉar la solvojn influas pli forte la dua kondiĉo.

Konsiderante la pozitivecon de la dekstra flanko de la ekvacio (24), la kondiĉo esprimita per tiu ekvacio avantaĝas la kondiĉon $D \cos u = o$ ĉiam kiam $\cos u > o$, t. e. ĉirkaŭ la perihelio, kaj la avantaĝo estos kontraŭa kiam la pozicio estas ĉirkaŭ la afelio. Sed la sperto montras — tute kompreneble — ke oni observas novajn planedetojn precipe ĉirkaŭ la perihelio, des pli tiujn kiujn ni sukcesas observi nur 1—2 foje (en la pozicioj malproksime de la perihelio ilia brilo estas malforta).

Surbaze de ĉi tio oni povas aserti ke la supozo pri cirkleco de la orbitprojekcio iomete avantaĝas la supozon pri cirkleco de la orbito mem (ne pro la moviĝnaturo, sed pro la orbitparto en kiu oni plej ofte observas planedetojn por kiuj ni estas devigataj serĉi elementojn de cirkla orbito). Se ni konsidoros nur la komencajn donojn, la solajn kiujn ni disponas, la supereco estas des pli granda ju pli grandaj estas e kaj e', t. e. ju pli **E** kaj **t** deflankiĝas de la ekliptiko.

Por akomodi la vektoran metodon al la nova supozo, ni ekiros de la ekvacioj (13), kiuj valoras por la elipsa moviĝo, kaj ni aplikos la diritan kondiĉon — en la formo (24). Tiam la ekvacioj (15) fariĝas

$$(25) \qquad \begin{cases} x(\rho' - \mathbf{Rt} - \mathbf{VE}) = \alpha + e(\rho e' + \rho' e) \\ (\rho' - \mathbf{VE})^2 + \rho^2 \mathbf{t}^2 - 2\rho \mathbf{Vt} + \mathbf{V}^2 - (\mathbf{VE})^2 = \\ = \dfrac{1}{r}\left(1 - \dfrac{\rho^2 e^2}{r^2}\right)^{-\frac{1}{2}} + (\rho e' + \rho' e)^2 \\ r^2 = x^2 + w. \end{cases}$$

Ĉe ilia solvado nenio grava ŝanĝiĝas, nur anstatau α venos la dekstraflanka esprimo de la unua ekvacio kaj anstataŭ $\frac{1}{r}$ venos $\frac{1}{r_1} + (\rho e' + \rho' e)^2$, kie $r_1^2 = x^2 + w - \rho^2 e^2$. Do anstataŭ la ekvacioj (19) ni havas

$$(26) \qquad \begin{cases} r_1^2 = x^2 + w - \delta^2 \\ \dfrac{1}{r_1} = \gamma - (\delta')^2 + \mathbf{t}^2 x^2 - \beta x + \\ \quad + \dfrac{\alpha + \delta\delta'}{x}\left(\dfrac{\alpha + \delta\delta'}{x} + 2\mathbf{Rt}\right), \end{cases}$$

kie pro malpli longa skribo mi metis

$$(27) \qquad \begin{cases} \delta = \rho e \\ \delta' = \rho' e + \rho e' \end{cases}$$

Tiel ni havas la ekvaciojn kies proksimumo (kun $\delta = o$, $\delta' = o$) estas la ekvacioj (19). Kiam oni solvis la ekvaciojn (19), oni povas trovi δ kaj δ' el (27) kaj (23), kaj tiam denove solvi la ekvaciojn — nun en la formo (26). Se la novaj solvoj grave diferencas de la antaŭaj, kio okazos kiam δ kaj δ' ne nul-

proksimas, tiam oni ripetos la kalkulon de δ kaj δ' kaj la solvadon de la ekvacioj.

Rigardante pli detale la unuan ekvacion (26) ni vidas ke la influo de la kvanto $\delta\delta'$ estas eta, ĉar oni multiplikas ĝin antaŭe per $\frac{\alpha}{x}$, kie α estas kutime eta nombro kaj apud la kurbotranĉo $x > 1$. Sed pro la kvanto $(\delta')^2$ la tuta parabolsimila kurbo malsupreniĝas, sekve la tranĉo grave ŝanĝiĝas, ĉar la angulo ĉe la tranĉo estas tre akra. Pro tio mi diris jam ke la unua kondiĉo (pri orteco inter la rapido kai la pozicivektoro) ne estas esenca, sed gravas la dua kondiĉo (pri konstanteco de la rapido). Ĉar krome ni vidis ke laŭ la unua kondiĉo ni povus nenion certan diri pri avantaĝo de unu el la supraj supozoj, ni povas libere preni ĝin en la formo $\mathbf{rv} = o$, resp. $\delta\delta' = o$. Tio plifaciligas la laboron kaj en la orbitkorektado lasas resti nur du novaj kvantoj: δ^2 kaj δ'^2.

Oni povas facile vidi ke la ĉeestoj de δ^2 kai δ'^2 influas la solvon en la sama direkto. Nome la parabolsimila kurbo malsupreniras je la kvanto δ'^2 kaj la alia kurbo iom supreniras, ĉar evidente

$$\frac{1}{r_1} > \frac{1}{r}, \quad \text{pro} \quad r_1^2 = r^2 - \delta^2 < r^2.$$

7) Efektivigo de la korektoj

Konsidere la lastan rezonadon, t. e. la retenon de la kondiĉo $\mathbf{rv} = o$ neŝanĝita, oni povas matematike pritrakti la problemon ankaŭ alimaniere. Eku de la trovita solvo (ρ, ρ'), kiu respondas al la kondiĉoj $\mathbf{rv} = o$, $\mathbf{v}^2 = \frac{1}{r}$, kaj serĉu la bezonajn korektojn por kontentigi la kondiĉojn $\mathbf{rv} = o$, $\mathbf{v}^2 = \frac{1+\zeta}{\mathbf{r}}$.

Tiam laŭ (10) kaj (11) estos

$$\Delta\mathbf{r} = \mathbf{E}\cdot\Delta\rho, \qquad \Delta\mathbf{v} = \mathbf{t}\cdot\Delta\rho + \mathbf{E}\cdot\Delta\rho',$$
$$2r\Delta r = 2x\Delta x = 2x\Delta\rho,$$
$$\mathbf{rE} = x, \qquad \mathbf{rt} = -\mathbf{Rt}, \qquad \mathbf{vE} = -\mathbf{VE} + \rho',$$
$$\mathbf{vt} = -\mathbf{Vt} + \rho\mathbf{t}^2,$$

sekve el la starigitaj kaj el jam kontentigitaj kondiĉoj ni trovos

$$(\mathbf{E}\Delta\rho, \mathbf{v}) + (\mathbf{r}, \mathbf{t}\Delta\rho + \mathbf{E}\Delta\rho') = o,$$
$$\frac{x}{r}\Delta\rho\cdot\mathbf{v}^2 + r\cdot 2\,(\mathbf{v}, \mathbf{t}\Delta\rho + \mathbf{E}\Delta\rho') = \zeta,$$

resp.

$$\Delta\rho' = -\frac{\mathbf{rt} + \mathbf{vE}}{\mathbf{rE}}\Delta\rho = \frac{\mathbf{Rt} + \mathbf{VE} - \rho'}{x}\Delta\rho$$

$$\left[\frac{x}{r^2} + 2r\,(\rho\mathbf{t}^2 - \mathbf{Vt})\,\Delta\rho + 2r\,(\rho' - \mathbf{VE})\cdot\Delta\rho'\right] = \zeta\,.$$

La unua de la ekvacioj, pro la unua ekvacio (15), donas

$$(28) \qquad \Delta\rho' = -\frac{\alpha}{x^2}\cdot\Delta\rho\ ,$$

kaj la dua fariĝas

$$2r\cdot\Delta\rho\left[\frac{x}{2r^3} + \rho'^2 - \mathbf{Vt} - \frac{\alpha}{x^2}(\rho' - \mathbf{VE})\right] = \zeta$$

$$(29) \qquad \Delta\rho = \frac{\zeta}{2r\left[-\mathbf{Vt} + \rho\mathbf{t}^2 + \frac{\alpha}{x^2}(\mathbf{VE} - \rho')\right] + \frac{x}{r^2}}$$

Ĉi tian rezonadon apliku al la traktata problemo per la respektiva elekto de ζ. Laŭ la dua ekvacio (26) kaj laŭ (27) ni devas preni

$$(30) \qquad \zeta = r\,(\delta')^2 + \frac{r}{\sqrt{r^2 - \delta^2}} - 1 = r\,(\delta')^2 + \left(\frac{r}{r_1} - 1\right).$$

Kun ĉi tiu valoro de ζ la supra problemo estas solvita en la ekvacioj (29) kaj (28).

Rimarko Ĉi tiu vojo por la problemsolvo estas la sama ankaŭ kiam ζ ne venas pro la supoz-malsamo, sed pro iu kalkuleraro. Nome dum solvado de (19), resp. (15), se ni trovos eraran r, la trovotaj vektoroj $\mathbf{r}$ kaj $\mathbf{v}$ ne kontentigos la kondiĉojn (12). Sed la solvado de la unua ekvacio (15) estas simpla kaj ĝi estos — oni rajtas diri ĉiam — kontentigita, sed la trovita kvanto $\mathbf{rv}^2$-1 diferencos de nulo, resp. de la esprimo (30), por iu kvanto kiun ni prenu kiel ζ. La problemo nun estas: trovi la korektojn $\Delta\rho$, $\Delta\rho'$, sen kontrolo de la tuta kalkulo, tiel ke kontentiĝu la kondiĉoj (12), t.e. $\Delta(\mathbf{rv}) = 0$, $\Delta(\mathbf{rv}^2) = \zeta$. La problemo estas laŭforme identa kun la antaŭa kaj tial la solvo troviĝas en la formuloj (29) kaj (28).

Jam aplikita tiu aŭ alia procedo, estas ĉiam facile el la solvo kun supozo de cirkla orbito trovi la solvon kun supozo de la cirkla orbitprojekcio. Tiel mi trovis la korektojn por kelkaj ekzemploj el la parto (5), tie kie montriĝis ke oni bezonas la korektojn (aŭ kie la trovita orbito nesufiĉe bone prezentis la aliajn konatajn observojn).

Por la planedeto 1939 *GA* la trovitaj diferencoj estas etaj, nome

$r = 2{,}832$, $i = 3°{,}4$, $\Omega = 211°{,}5$ — la cirkla projekcio
$2{,}843$ $3{,}4$ $211{,}3$ — la cirkla orbito.

Ĉe la planedeto 1939 *GE*, kie estas gravaj diferencoj inter la diversaj solvoj, la apliko de la kondiĉo pri cirkla projekcio donis neglektindajn diferencojn. Tio estas komprenebla se oni konsideras ke du solvoj (trovitaj el unu — la sama — observo kaj la moviĝdirekto) konkordas, kaj de ili diferencas la tria (el du observoj).

Ĉe 1933 *QE*, kie la vektora metodo donas du solvojn, kaj la *Veithen*-metodo unu (la mezon), mi provis vidi ĉu eble la du solvoj pliproksimiĝas kun la supozo de cirkla projekcio, sed ankaŭ ĉi tie la ŝanĝoj estis sensignifaj.

Sed ĉe la planedeto 1940 *RE*, kiu ja iniciatis la esplorojn, la ŝanĝoj estas pli grandaj. Tio devenas de la proksimeco de la observo je la perihelio, de la ekscentriĝo 0,2 kaj de la granda devio inter la observita pozicio kaj la ekliptiko ($e = +0{,}253854$, $e' = -0{,}0534498$). En la unua alproksimiĝo estas $\delta = 0{,}503169$, $\delta' = -0{,}182091$, kaj oni trovas $\rho = 2{,}6708$, $\rho' = -0{,}3044$, kaj per la ripetita procedo $\rho = 1{,}8440$, $\rho' = -0{,}3242$. Do la diferenco estas grava, la trovita solvo pliproksimiĝis al la realo, sekve ankaŭ la efemerido trovita per ĉi tiuj elementoj — ĝi donas 0—K:

Dato	IX 9,885	13,104	21,782	28,876	X 11,055
$\Delta\alpha$	$0^m{,}0$	$0^m{,}0$	$0^m{,}0$	$-0^m{,}1$	$+0^m{,}1$
$\Delta\delta$	$0'$	$0'$	$-6'$	$-19'$	$-29'$.

En ĉi tiu okazo mi bezonis solvi ankaŭ la problemeton pri la vektora eltrovo de la efemerido, sub supozo ke la planedetprojekcio sur la ekliptiko moviĝas cirkle. Estos utile ekspozi ankaŭ tiun solvon.

Se estas konataj $\mathbf{r}_0$ kaj $\mathbf{v}_0$, iliaj projekcioj estos $[\mathbf{K}[\mathbf{r}_0\mathbf{K}]]$ kaj $[\mathbf{K}[\mathbf{v}_0\mathbf{K}]]$ kaj la moviĝon de la projekcio en la ekliptikebeno determinas la ekvacioj

$$(31)\qquad \mathbf{r}' = [\mathbf{K}[\mathbf{r}_0\mathbf{K}]]\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\sin u_1\,[\mathbf{K}[\mathbf{v}_0\mathbf{K}]] = [\mathbf{K}[\mathbf{r}_0\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\,\mathbf{v}_0\sin u_1,\ \mathbf{K}]]$$

$$u_1 = (t - t_0):(r_1\sqrt{r_1}),\qquad r_1 = |[\mathbf{r}_0\mathbf{K}]| = \sqrt{r^2 - \delta^2}\,.$$

La punkto en la orbito, super la punkto en la ebeno, moviĝos tiel ke

$$\mathbf{r} = \mathbf{r}' + \mathbf{K}(\mathbf{rK}).$$

La multipliko per $\mathbf{C}$ donas

$$0 = \mathbf{r}'\mathbf{C} + (\mathbf{KC})(\mathbf{rK}),$$

do

$$\mathbf{r} = \mathbf{r}' - \mathbf{K}\frac{\mathbf{r}'\mathbf{C}}{\mathbf{KC}}.$$

Sed, pro (31),

$$\mathbf{r}'\mathbf{C} = -(\mathbf{CK})(\mathbf{K},\ \mathbf{r}_0\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\,\mathbf{v}_0\sin u_1),$$

kaj ni havos

$$\mathbf{r} = [\mathbf{K}[\mathbf{r}_0\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\sin u_1\,\mathbf{v}_0,\ \mathbf{K}]] + \mathbf{K}(\mathbf{K},\ \mathbf{r}_0\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\,\mathbf{v}_0\sin u_1).$$

definitive

$$(16')\qquad \mathbf{r} = \mathbf{r}_0\cos u_1 + r_1\sqrt{r_1}\,\mathbf{v}_0\sin u_1.$$

Ĉi tiu esprimo diferencas de la cirkla moviĝo en la orbitebeno, t.e. de (16), nur je la grando de la radiuso (kiu ŝanĝita eniras ankaŭ en la esprimon por u).

Se ni ja ekiras de la cirklaj elementoj r, i, Ω, $\mathbf{r}_0$, $\frac{dl}{dt}$, ni havos la komencajn vektorajn donojn (por la ekvatora koordinatsistemo):

$$\mathbf{r}'_0 = r(\cos l_0\,\mathbf{i} + \cos\varepsilon.\ \sin l_0\,\mathbf{j} + \sin\varepsilon\ \sin l_0\,\mathbf{k}),$$

$$\mathbf{c}' = \frac{\mathbf{C}}{\cos i} = \operatorname{tg} i\ \sin\Omega\,\mathbf{i} - (\sin\varepsilon + \cos\varepsilon\ \operatorname{tg} i\ \cos\Omega)\,\mathbf{j} + (\cos\varepsilon - \sin\varepsilon\ \operatorname{tg} i\ \cos\Omega)\,\mathbf{k},$$

kaj tiam la moviĝo en la ekliptikebeno estos determinata per

$$\mathbf{r}' = \cos l\ \mathbf{r}'_0 + \sin l\ [\mathbf{K}\mathbf{r}'_0],\qquad l = \frac{dl}{dt}(t - t_0)\ ;$$

la moviĝo en la moviĝebeno estas donata per la esprimoj

$$\mathbf{r} = \mathbf{r}' - \mathbf{K}\frac{\mathbf{r}'\mathbf{C}}{\mathbf{KC}} = \frac{[\mathbf{C}[\mathbf{r}'\mathbf{K}]]}{(\mathbf{KC})} = [\mathbf{c}'[\mathbf{r}'\mathbf{K}]] = \cos l\,[\mathbf{c}'[\mathbf{r}'_0\mathbf{K}]] + \sin l\,[\mathbf{c}'[\mathbf{r}'_0\mathbf{K}]].$$

8) Realeco de la kalkulataj elementoj de cirkla orbito

Proksimumigo de elipsa moviĝo per cirkla decas en malgrandaj tempo-intervaloj. Sed kiam oni devas surbaze de la malgranda cirkla orbitparto trovi la tutan orbiton, t.e. elementojn de la elipsa moviĝo, tiam jam plurfoje montriĝis ke tio ne eblas. Ĉi tie mi tion montros per kelkaj ekzemploj kaj poste ankaŭ per analizo mi montros kial tio tie estas neebla.

Por la planedeto 1940 *RE* kun supozo de cirkla orbito oni trovis $r = 3{,}6$. Sed laŭ ĝiaj elementoj (n-ro 1454) estas $a = 2{,}62$ kaj en la observomomento $r = 2{,}1$. La diferenco estas eĉ pli granda ĉe la inklino ($27^0{,}8$, resp. $12^0{,}1$). Iom pli bona rezultato estas se oni kalkulas la elementojn kun supozo de la cirkla projekcio sur la ekliptikebeno, ĉar tiam $i = 17{,}3$, $\Omega = 210{,}2$. Evidentas ke laŭ tiaj elementoj oni ne povus eĉ indiki la identecon kun la vera planedeto, des pli ne starigi la identecon.

Ĉe la planedeto 1939 *GE* estas tre granda jam la diferenco inter duspecaj cirklaj orbitoj ($r = 1{,}34$, $i = 8^0{,}9$, resp. 2,33 kaj $19^0{,}2$). Mi provis trovi elementojn de elipsa orbito el 3 observoj, sed oni alvenas al la kazo kiam k (en *Gauss*-a metodo) estas negativa ($-1{,}31$), tiel ke la tercentra distanco estas tre malgranda, aŭ kun la donoj io ne estas en ordo, — ĉiuokaze la cirkla orbito kondukas nil al erara vojo.

Tri cirklaj orbitoj de la planedeto 1939 *GA* montras relativan konkordon. Sed, ĉar oni havas 3 observojn en daŭro de 8 tagoj, mi provis trovi la elipson, malgraŭ neprecizeco de la observodonoj. La unua alproksimiĝo donas $\rho_1 = 0{,}524$, $\rho_2 = 0{,}524$ $\rho_3 = 0{,}492$, kio estas tre diversa de $\rho = 1{,}86$ ĉe la cirklaj orbitoj (Al ĉi tiaj valoroj de la tercentraj distancoj korespondas $i = 16^0{,}8$, $\Omega = 229^0{,}5$, dume ĉe la cirklaj orbitoj $i = 4^0{,}5$, $\Omega = 206^0{,}9$ resp. $i = 3^0{,}4$, $\Omega = 211^0{,}3$). La donoj ne estas sufiĉe precizaj por povi daŭrigi kun la alproksimiĝoj, sed la analizo de la solvo montras ke la terdistancoi povas ŝanĝi nur malmulte.

Kaj fine la ekzemplo de 1933 *QE*. Giaj cititaj cirklaj orbitoj montras grandan distancon kaj tre grandan inklinon. Ĉar oni havas 5 ĝiajn observojn, mi same provis trovi elipsajn elementojn. Unue mi forĵetis la lastan observon, ĉar ĝi ne kuŝas sur la linio de aliaj observoj, ankaŭ la efemerido laŭ kiu ajn cirkla orbito montras grandetajn deflankiĝojn. Aliaj 4 observoj donis $\rho = 0{,}3665$, $\rho' = +0{,}0369$. La efemerido montras pli etajn deflankiĝojn ol kun la cirklaj orbitoj. La provoj plibonigi la orbiton surbaze 0-K malprigrandigas ρ, ankaŭ la analizo de la esprimoj por ρ kaj ρ' montras ke ρ neniuokaze povas esti granda, t.e. ke la trovitaj cirklaj orbitoj estas tute nerealaj.

Jam ĉi tiuj ekzemploj montras ke *cirklaj orbitoj ne povas solaj servi por identigo de nekonata planedeto kun konata*, eĉ ili ne povas kun certeco montri mallarĝan nombron de planedetoj el kiuj unu povas esti identa kun la nekonata, ĉar la deflankolimoj estas tre grandaj. Alio estas la demando kiajn aliajn donojn oni povas ricevi per variado de la trovitaj solvoj, por per tiuj donoj aliri al identiglaboro, kiel tion faras ekz. *Patry* [4].

Analize oni povas montri pro kio povas deveni grandaj diferencoj inter la cirklaj kaj la elipsaj orbitoj. Ekiru de la rigoraj ekvacioj (13), validaj por elipsa moviĝo, kaj metu

$$\frac{D}{E}\sin u = \eta\ , \quad D\cos u = \zeta\ . \tag{32}$$

Tiam el (10) kaj (11) ni havas

$$\begin{cases} \mathbf{RV} + \rho'(\rho - \mathbf{RE}) - \rho(\mathbf{Rt} + \mathbf{VE}) = \eta \\ \mathbf{V}^2 + \rho'^2 + \rho^2\,\mathbf{t}^2 - 2\rho'\,\mathbf{VE} - 2\rho\,\mathbf{tV} = \dfrac{1+\zeta}{r} \\ r^2 = (\rho - \mathbf{RE})^2 + [\mathbf{RE}]^2. \end{cases} \tag{33}$$

Enkondukante la signojn (14) kaj (18), per la sama vojo kiel antaŭe, ni trovos

$$\frac{1+\zeta}{r} = \gamma + \mathbf{t}^2 x^2 - \beta x + \frac{\alpha+\eta}{x}\left(\frac{\alpha+\eta}{x} + 2\mathbf{Rt}\right)$$

$$r^2 = x^2 + w.$$

La solvojn de la ekvacio oni povas serĉi simile kiel en la p. 4 de la verkaĵo. La respektivaj linioj ne ŝanĝas esence sian formon. La parabolsimila kurbo grave ŝanĝiĝas ĉe malgrandaj x, sed por grandaj x la ŝanĝoj malpligrandiĝas. Sede la dua kurbo ekiras ne de la nulordinato $\frac{1}{\sqrt{w}}$, sed de $\frac{1+\zeta}{\sqrt{w}}$. Ĉar w estas malgranda kvanto kaj ζ povas, laŭ (32), atingi grandon de la ekscentriĝo, tial la kurbo povas multe ŝanĝi sian pozicion kaj per tio influi ne nur la pozicion de la tranĉoj sed eĉ la tranĉoeblecon mem, kio klare vidiĝas de la bildo 3.

Ĉar la kazoj de la respektivaj kurbopozicioj de la b-do 3a estas nur escepto, haltiĝu ĉe la b-do 3b kaj komparu la analizan rezonadon kun la ekzemploj. Unue oni povas el la bildo, konsiderante ke $\zeta > 0$ (la observoj de novaj planedetoj estas ĉirkaŭ la perihelio), konstati ke la reala tranĉo estos maldekstre de la tranĉo kiun oni havis serĉinte cirklan orbiton. Tion bele montras ankaŭ la unua ekzemplo (1940 *RE*), kies elipson oni konas kaj oni povas kompari la kalkulon kun la realo. La dua ekzemplo donis la tranĉon proksime ĉe $r = 2{,}33$, kaj jam la cirkla orbito el du observoj en 6-taga intervalo donas $r = 1{,}34$, krome la provoj eltrovi la elipsan orbiton montris nur la eblecon de granda ekscentriĝo kaj malgranda tercentra distanco. La b-do 3b ankaŭ ĉi tie direktigas al $x \sim 1$ se oni ekiras kun iom pli granda ζ.

Simile estas kun la planedeto 1933 *GA*. Kiel mi jam menciis, la proksimuma elipsa orbito donas $\rho \sim 0{,}5$ kaj la cirklaj orbitoj donas $\rho = 1{,}86$. Ankaŭ ĉi tie tio bone klariĝas per ioma leviĝo de la dua kurbo. Sede ĉe la planedeto 1933 *QE* la cirkla orbito trovita de *Nishiyama* korespondus al tre mallevigita kurbo, ĉe kio la du tranĉoj reduktiĝas je la tanĝo; miaj solvoj korespondus al iom levigita kurbo, per kio venas du relative proksimaj solvoj. Kaj kiam oni supozas ioman ekscentriĝon la kurbo grave leviĝas (ĉar $w = 0{,}04$) kaj la tranĉo foriras grave maldekstre, t.e. ni havos la kazon de la b-do 3a.

La konkordo inter la ekzemploj kaj la analizo estas do kompleta. Pro tio oni povas denove substreki ke la solaj cirklaj orbitoj estas tute necertaj por la identiglaboro, sed kiel la sperto montris (ankaŭ la menciita kaj analizita ekzemplo 1940 *RE*), ili povas bonege servi por plua urĝa serĉado de planedeto observita 1—2 foje. Ligite kun tio mi povas montri unu „paradokson". Nome por tre proksimaj pozicioj iam estas pli bona apliko de la eksterpolado ol la cirkla orbito (kaj ĉiuokaze pli profita). Jen la komparo sur la ekzemplo 1939 *GE*, kie (ekde la 15-a de aprilo) por la 19-a kaj 21-a de aprilo (poste kompreneble avantaĝus la cirkla orbito) estas trovita:

	Per ekstrapolo		Per cirkla orbito	
α	206°,538	206°,038	206°,571	206°,084
δ	+23 ,962	24 ,095	+ 23 ,903	23 ,968

La observoj

206°,539	206°,035
+ 23 ,931	24 ,091.

Fine mi rerigardu la utiligon de la Ter-moviĝo tian kia ĝi estas. Kontraŭ tioma precizeco estas: neprecizeco de la dono pri la moviĝdirekto (t.e. de la vekroro **t**) kaj la nevola neglekto de la ekscentriĝo de la planedetorbito (t.e. de la kvantoj signitaj per η kaj ζ). La riproĉoj estus pravaj se la kvantoj **RV** kaj $\mathbf{V}^2 - 1$ estus neglektindaj kompare kun aliaj neprecizaj donoj el la ekvacioj, t.e. **RV** kompare kun η kaj kun la eraro en ρ. **Rt** (en la unua ekvacio) kaj $\mathbf{V}^2 - 1$ kompare kun $\frac{\zeta}{r}$ kaj kun la eraro en $\rho^2 t^2 - 2\rho \mathbf{Vt}$ (en la dua ekvacio). Sed por la Ter-moviĝo farataj la esprimoj (32) montras ke ĉu **RV** ĉu $\mathbf{V}^2 - 1$ povas iri ĝis la grando de la Ter-orbita ekscentriĝo (eĉ iom pli, kiam oni konsideras ke la lokoncentra moviĝo de observanto tre devias de la elipsa moviĝo de la baricentro). Kaj kun eta precizeco en la eltrovo de la vektoro **t** (speciale helpe de la procedo el [7]), eraroj en la menciitaj esprimoj estos pli malgrandaj ol la Ter-ekscentriĝo. Nur la kvanto $\frac{\zeta}{r}$ povas esti grave pli granda ol la Ter-ekscentriĝo. Sed mi jam diris ke ni ne scias kioma ĝi povas esti, des pli ni ne rajtas pligrandigi ĝin proksimumigante $\mathbf{V}^2$ per 1. Krome eltrovante cirklan orbiton ni esperas jus ke ni ne troviĝas en kazo de gtanda $\frac{\zeta}{r}$, ĉar tiam — kiel ni vidis el la antaŭa ekspozo — cirklaj elementoj malproksimegas de la vera elipsa moviĝo de la planedo.

Pro ĉio tio tamen utilas preni la moviĝon de la observanto tian kia ĝi estas, des pli ĉar tio eĉ ne pligrandigas la penon.

LA MENCIITA LITERATURO:

[1] *Andoyer H.:* „Cours de Mécanique céleste" I, Paris 1923, Gauthier Villars.

[2] *Fabry L.:* „L'identification des petites planètes", Bulletin astronomique 30, Paris 1913, pp. 49—64.

[3] *Michkovitch V. V.:* „Sur l'identification des petites planètes", Mémoires I de l'Observ. astr. de Belgrade, pp. 26—37.

[4] *Patry A.:* „Catalogue d'orbites circulaires de certains asteroîdes non numérotés", Journal des observateurs XXXV, 1952, pp. 153—170.

[5] *Picard L.:* „Sur l'utilisation des observations photographiques de petites planète pour le calcul de leurs orbites", Bulletin astronomique, 32, Paris 1915, pp. 291—309.

[6] *Popović B.:* „Nouvelle méthode pour obtenir les équations des perturbations...", Mémoires V de l'Observ. astr., Beograd 1949, pp. 11—25.

[7] *Popović B.:* „Pliprecizigoj de eltrovataj rapidoj de planedetoj" Bulletin XXI (1956) de Astron. observ. Beograd, pp. 11—22.

[8] *Protitch M.:* „Sur la determination de l'orbite circulaire d'après une position observée et le mouvement diurne", Mémoires V de l'Observ., astr. Beograd 1949, pp. 27—52.

TABLE DES MATIÈRES

Page

P. Djurković, Lj. Dačić, Mesures micrométriques d'étoiles doubles 1

B. Švarlić, G. Teleki, Observations à la lunette zénithale 2

Z. Brkić, Lj. Mitić, M. Jovanović, Déterminations de l'heure en 1957 3

Z. Brkić, Lj. Mitić, Heures demi-définitives des émissions enrégistrées de T. S. F. déduites des déterminations de l'heure, faites en 1957 à l'Observatoire de Beograd 4

M. Protitch, Activité des taches solaires et des protubérances 8

V. Glumac, Beobachtung der Aurora borealis 9

R. Mitrinović, Éléments des orbites circulaires 10

R. Mitrinović, Orbites circulaires des petites planètes 12

R. Mitrinović, Identification 1937 HB=1496 (1938 SA_1) 12

Lj. Mitić, Sur une possibilité de déterminer l'équation personelle (de mouvement) dans les observations de passage faites avec un instrument du type Bamberg 12

R. Mitrinović, Sur la masse totale des petites planètes 15

B. Popović, Esploradoj pri utiligebleco de cirklaj orbitoj de planedetoj 19

IMPRIMERIE DE L'ENTREPRISE GRAPHIQUE „AKADEMIJA"
BEOGRAD — KOSMAJSKA 28.